Universala Esperanto-Asocio

**EKZAMENOJ de KER**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko EKO 2017-10 sendita el Roterdamo, la 23an de aprilo.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj de AMO, listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj.

## Ekzamenoj de KER en la Universala Kongreso

La Ekzamena Komisiono de UEA informas vin ke ekde nun **eblas aliĝi al la KER-sesio en Seulo**. La ĉefa dumkongresa ekzamentago estos vendredo, la 28a de julio. Tiam, ekde la 12a horo komenciĝos la skribaj ekzamenoj. Paralele kun ili okazos la laboratoriaj sesioj. La individuaj parolaj ekzamenoj okazos dum la tuta semajno, ekde la 23a de julio, dimanĉo, laŭ apartaj aliĝoj kaj rendevuoj. La 24an, lundon posttagmeze viziteblos informprogramo pri la ekzamenoj.

Por ke ni povu organizi la sesion kaj ĉiu interesiĝantoj povu trapasi ekzamenon, ni petas vin aliĝi kiel eble plej frue. La formularon vi trovas sur la paĝo de la aliĝoj. http://edukado.net/ker/sesioj

## Kvar pliaj sesioj ĝis UK

Krom tiuj estos du sesioj en Usono, unu dum la Landa Kongreso kaj la alian dum la somera kursaro NASK, ambaŭ en julio en la urbo Raleigh.

KER-ekzameno okazos en la 76a nacia kongreso en Hispanio, en la urbo Teruel inter la 23a kaj 25a de junio.

En Herzberg, en Germanio, eblos trapasi sesion ankaŭ la 2an de julio.




## Vasta oferto en la Tutmonda Ekzamentago

Kadre de la Tutmonda Ekzamentago (en la 10a de junio kaj la 17a de junio) en 20 lokoj de 15 landoj okazos KER-sesioj.

Tiuj urboj estas: Arrout-Tuluzo (**FR**), Bogoto **(CO)**, Chaumont (**FR**), Ĉenduo (**CN**), Hago (**NL**), Guangzhou (**CN**), Kuritibo (**BR**), La Chaux-de-Fonds (**CH**), Leipzig (**DE**), Londono (**GB**), Malmö (**SE**), Managvo (**NI**), Moskvo (**RU**), Subotica (**SR**), Maceio (**BR**), Parizo (**FR**), San-Francisko (**US**), Saint-Brieuc (**FR**), Tokio (**JP**) Zaragoza (**ES**). Tiuj oficialaj landkodoj estas troveblaj fine de *Jarlibroj*.

Bv. skribi al la adreso videbla en <edukado.net> por scii la precizajn datojn por ĉiu unuopa urbo, kaj la preciza propono: ĉu nur skriba, ĉu ankaŭ parola (do kompleksa).

Pri la sesio en London, rigardu la paĝon http://esperanto.org.uk/events/ekzamenoj/ EAB okazigas la sesion, kaj havas planon repagi la kostojn al loĝantoj de Britio.

Por vidi la staton de aliĝoj en tiuj sesioj vidu ĉe:
http://edukado.net/ekzamenoj/ker/aktuale

En ĉiuj sesioj inter nun kaj la UK en Seulo estas jam registritaj 127 aliĝoj.

Vortoj: 340



Foto de kandidatoj en la dua tutmonda ekzamensesio en 2013 en Tuluzo, Francio.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj aŭ elŝuteblaj ĉe:
http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.